

N-ro 150 Somero 2009

ISRAELA ESPERANTISTO

ISSN 1565-3315

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו בישראל

Rememoroj pri ELI (J. Šemer)

Mihael Gišpling (recenzis: L.Carol)

Bluaj kaj verdaj steloj en Bjalistoko (A. Wandel)



Prezidento Shimon Peres ekzamenas la KD-on "Bonvenu Paco" ĉe la budo de ELI en la Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo, februaro 2009 (p.6)



Redaktoro Amri Wandel
Vicedaktoro Sergej Tyirin
Prezidanto Amri Wandel

Redakcia adreso
P.O.K. 15092, IL-84120 Beer-Sheva
ie@esperanto.org.il

Abontarifo por eksterlandanoj: 10 EUR.
Eblas transpigi al UEA-konto *elia-q*
aŭ mendi ĉe la Libroservo de UEA.

Administra adreso
P.O.K. 22041, IL-61220 Tel-Aviv
eli@esperanto.org.il

Anonctarifoj por duona paĝo:
nigra-blanka 35 EUR, plenkolora 50 EUR.

Fondita en 1959 kiel 'Nia Ligilo'.

Enhavo

- 3 Rememoroj de veterano [PARTO I]
.....*Josef Ŝemer*
- 6 Esperanto en la Internacia
Libro-Foiro*Amri Wandel*
- 8 La 2-a Mezorianta Kunveno en
Turkio*Esti Saban*
- 9 Esperanta travivaĵo en Japanio
[PARTO II].....*Hagar Lidor*
- 10 RECENZO Miĥael Giŝpling
.....*Luiza Carol*
- 14 Travivaĵoj en Nepalo
[PARTO II].....*Amri Wandel*
- 16 Invito al la 10-a KIES en Pacoazo
.....*Amri Wandel*
- 17 RUBRIKO Persona renkontiĝo
.....*Dina Newman*
- 18 Verdaj kaj bluj steloj en Bjalistok'
.....*A. Wandel, J. Ŝemer*
- 22 Nekrologo – Iren Struloviĉ
.....*Josef Ŝemer*

Karaj Legantoj,



En 1959 aperis numero unu de "Nia Ligilo", kiu poste fariĝis "Israela sperantisto". IE festas do duoblan jubileon: 50 jarojn de nia bulteno, kaj la numeron 150.

Vi trovos artikolon pri la 50-jara historio de ELI kaj povos legi pri la partopreno de ELI en la Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo. **Esti Saban** rakontas pri la Azia agado en KAEM kaj en la dua Mezorianta Kunveno kaj restante en Azio ni daŭrigos la vojaĝojn tra Japanio kaj Nepalo, komencitaj en la antaŭa numero. Vi povos legi recenzon el la plumo de nia nova talento **Luiza Carol** pri nia jam internacie konata poeziisto **Miĥael Giŝpling**, kaj sperti la UK-on en Bjalistoko el juda vidpunkto. En la rubriko "Persona Renkontiĝo" aperas **Dina Newman** – raportistino en la BBC kiu venis al Israelo por raportoj pri politiko, sed raportis pri... E-o. Agrablan legadon, *Amri*

Rememoroj de israela Esperanto-veterano

Josef Ŝemer

Unua parto: 1966 – 1968

LA 11.11.2008 MI komencis gvidi kurson de Esperanto en la Centro Bikurej-Haitim, Tel-Avivo. Mi staris ĉe la tabulo rigardante la 10 novajn diversaĝajn gelernantojn kaj subite pensis: “Ja ĝuste en tiu ĉi klasĉambro mi lernis Esperanton en la jaro 1966, do antaŭ 42 jaroj!” Ĉu tio ne estas mirinda?!

Kiel 16-jara tel-aviva knabo mi aliĝis tiam al la unua kurso de d-ro Henryk Maschler [Henrik MAŝLER]. Mi vidis en la strato grandan afiŝon, kiu anoncas kurson de Esperanto, kaj tuj decidis aliĝi. Pri la Internacia Lingvo mi aŭdis de mia patro, kiu fieris pri tio, ke la kreinto de tiu ĉi lingvo estis lia samurbano, do Bjalistokano. Mi partoprenis la kurson lernante tre fervore kaj tuj enamiĝis je Esperanto. Tiu ĉi “viruso” infektis min tiam kaj ne forlasis min ĝis nun. Kiel mi jam diris, la kurso okazis en la sama ĉambro kie okazas nuntempe ĉiumarde la kunvenoj de la E-klubo kaj ankaŭ la nuna kurso. Sed la centro “Bikurej-Haitim” portis tiam la nomon “Bejt Ha-noar” (Junulara Domo).

La iniciatinto de la kurso kaj la instruisto mem, d-ro Maŝler (1908–1991), estis eksterordinara homo kaj unika kuracisto, ege amata de ĉiuj. Li lernis Esperanton nur kelkajn jarojn post sia alveno al Israelo el Pollando (en 1950), kaj tuj ekaktivis en la



movado. Li ekkomprenis, ke sen kursoj tiu ĉi eta movado ne havas estontecon. Tiam li decidis traduki hebrean (helpe de kelkaj bonaj hebrelingvanoj) pollingvan lernolibron de Esperanto, kaj adapti ĝin por la hebreparolantoj. Li mem propagandis la kurson kaj mem organizis la tutan bezonatan loĝistikon. Li instruis tre fervore, kun granda amo. Li ankaŭ kuraĝigis la

lernantojn viziti la tel-avivan E-klubon, kie oni kunvenis ĉiun dimanĉon je 20:00 en komforta ĉambrego ĉe str. Kálišer 48 (apud la stratoj Naĥalát Binjamín kaj Állenby). Nia Ligo ricevis malavare tiun ĉi lokalon por ĉiudimanĉa uzo jam en marto 1959 (!) de la grupo “Arbajter Ring” (t.n. “Jidistoj”). Tuj post la kurso, kiu finiĝis la 8-an de aŭgusto 1966 (laŭ la atestilo kiun mi gardas ĝis nun!), mi komencis viziti regule tiun ĉi klubon. Mi neniam forestis de la kunvenoj, eĉ kiam en la morgaŭa mateno estis okazonta matur-ekzameno en la mezlernejo. Mi biciklis tien de mia hejmo, en la nordo de Tel-Avivo. Mi neniam forgesos kiel mi – 17-jarulo – ĉeestis la klubkunvenon okazintan dimanĉe la 4-an de junio 1967 vespere, kaj ankaŭ la sekvantan, kiu okazis dimanĉe la 11-an de junio. Eble kelkaj el vi memoras kiu grava evento okazis inter tiuj du datoj: jes, la Sestaga Milito! La milito komenciĝis lundon la 5-an de junio matene kaj finiĝis sabaton la 10-an de junio posttagmeze. Do, verŝajne niaj generaloj planis la militajn demarŝojn tiel ke nia ĉiudimanĉa kluba agado ne estu ĝenata...

En la komenco ni estis nur du junuloj en la klubo: mi kaj plia kursfininto, same gimnaziano. Post kelka tempo li ĉesis veni kaj mi restis la sola



“infano” tie. Mi sentis min iomete strange inter la “maljunuloj”, sed mia amo al Esperanto estis tiel forta, ke mi decidis tamen resti. Mi konsideris la aliajn

klubanojn “maljunuloj”, sed kiam mi pensas pri tio nun – estante 58-jara – mi komprenas, ke ili estis tiam “nur” 50-60-jaraj, do simile al mia nuna aĝo...

Mi menciuj kelkajn tiamajn lokajn aktivulojn kaj ankaŭ aliajn membrojn, kiuj kontribuis dum tiuj jaroj (1966–1968) al la kluba programo: Isaj kaj Anna Dratwer, d-ro Henrik Maŝler, Aleksander Manor, Dora Wunderbaum, Naĥum Drezner, Jehiel Ben-Alter, Nissim Israeli, Israel Israeli, d-ro Jaakov Beĥar, Josef Murĵan, Aŝer Ron, Kamil Perlman, Jeraĥmiel Giladi kaj Jehuda Feĥter-Bar Ŝraga. Preskaŭ ĉiuj klubanoj kaj aktivuloj naskiĝis eksterlande, ilia plimulto en Pollando, kaj kelkaj aliaj en Bulgarujo, Rumanujo kaj Ruslando.

Estas malĝoje pensi nun pri tio, ke ĉiuj tiuj supre menciitaj karaj homoj, kaj ankaŭ la aliaj aktivuloj de ELI, vivintaj en aliaj landpartoj (Josef Kohen-Cedek, Moŝe Savir, Jeĥezkel Armoni, Leo Ringler...), jam delonge forlasis nin poreterne. Kaj mi, kiu estis tiam la plej juna klubano, mi mem ne plu estas juna.

Estas tre malfacile imagi al ni nuntempe, kiamaniere oni sukcesis funkciigi tiam agadon de landa asocio kaj loka klubo: sen Interreto, sen komputilo, sen telefono (malmultaj familioj havis tiam hejman telefonon), sen faksilo, sen fotokopia maŝino, sen...

Kio okazadis en la tel-aviva klubo, krom societa interparolado kaj duonhora perfektiga instruado far d-ro Maŝler? Do, ĉiusemajne okazis prelego. Laŭ mia memoro, malsame ol hodiaŭ ne okazis tiam aliaj specoj de programoj. La plej elokventa preleganto estis la rumandevena Kamil Perlman el Petaĥ-Tíkva, kiu ofte rakontis al ni pri unu el la famaj pasintecaj komponistoj, pentristoj aŭ verkistoj. Do, dum la jaroj li rakontis al ni kelkajn fojojn, tre fervore kaj aktorece, pri Mozart, Haydn aŭ Schubert, ripetante la saman prelegon. Sed tio ne tro ĝenis la homojn, ĉar ili ŝatis lian parolmanieron.

Neforgesebla estis unu prelego de Aŝer Ron el Ra'anána, kiu parolis pri la Palestinanoj kaj la sorto de la “Okupataj Teritorioj”. Li ŝokis la aŭskultantojn dirante ke Israelo devas redoni la teritoriojn al la palestina popolo, por ke ĝi fondu tie sian propran ŝtaton. Memoru ke tio okazis nur kelkajn monatojn post la milito kaj tiuj ideoj, kiuj estas sufiĉe popularaj

nuntempe, estis tiam avangardaj kaj netolereblaj de preskaŭ ĉiuj el ni. Tial oni ege koleris je li kaj malhelpis al li per krioj; tiam li ofendiĝis kaj poste ne aperis en la klubo dum multe da tempo...

(daŭrigota)

Esperanto en la Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo

Amri Wandel



LA INTERNACIA Libro-Foiro de Jerusalemo okazas ĉiun duan jaron, kaj ĉi-jare jam la 24-an fojon, la 15-20 de februaro, en la prestiĝa kongres-centro “Binjanéj Ha’umá”. Ĝia celo estas eksponi librojn pri ĉiuj temoj, el la tuta mondo kaj en multaj lingvoj. Kiel antaŭ du jaroj, ELI funkciigis tutsemajne Esperanto-budon, kiu allogis multajn vizitantojn kaj vekis grandan interesiĝon. La budon organizis Amri Wandel kaj deĵoris en ĝi pli ol dek aktivuloj de ELI. Tiuj kiuj havis la okazon organizi grandan renkontiĝon eble konas la eksciton kaj adrenalino-plenan senton. La internacia etoso, la neceso solvi problemojn en mallonga tempo, kaj pleje, la homoj: la amaso da vizitantoj, la kunlaborantoj, jamaj kaj novaj geamikoj. Tiel por mi la sperto en la Libro-Foiro memorigis la organizadon de la Universala Kongreso en Tel-Avivo, antaŭ naŭ jaroj.

Kvankam nia E-budo estis malgranda, kompare kun la budoj de la grandaj eldonejoj aŭ kulturaj institutoj de ŝtatoj kiel Italio, Germanio kaj Francio, ĝi estis tre aktiva kaj vekis multan atenton. Iuj interesiĝis pri la centoj da Esperanto-libroj kaj revuoj kiuj estis eksponitaj sur la bretoj; aparte vekis atenton la libroj *Asteriks* kaj *La Eta Princo*. Aliaj scivolis pri la movado en Israelo kaj en la mondo (ofta demando estis: ĉu Esperanto ankoraŭ ekzistas?) kaj ne malmultaj demandis pri eblecoj lerni la lingvon. Kelkcentoj da petantoj ricevis informilon kun bazaj faktoj kaj retadreso pri Esperanto, kiu estis kunmetita speciale okaze de la Foiro. Multaj petis

aliĝi al la E-kursoj en Jerusalemo kaj Tel-Avivo, kiuj estis anoncigitaj ĉe la budo. Multaj lasis kontaktadresojn. Aliaj diris ke ili jam lernas per la retkurso *lernu!*. Vendiĝis lernolibroj, vortaroj, kompakt-diskoj, verdaj steloj kaj aliaj varoj por centoj da sikloj. Dum la deĵorado ni renkontis plurajn kortuŝajn rakontojn de vizitantoj, kiel pluraj rusdevenaj israelanoj kiuj lernis E-on en Rusio antaŭ multaj jaroj sed ne havis kontakton kun E-o post kiam ili alvenis al Israelo. Kelkaj el ili deziris ekviziti la E-klubojn en Tel-Avivo kaj Jerusalemo. Alvenis paro el Belgio kiu diris ke ili havas esprantistan parencon kiu aktivas en Antverpeno. Evidentiĝis ke temas pri bona konato mia – Ivo Durvael. Venis miaj kolegoj de la Jerusalema universitato, kiel Lucian – kiu laboras en la departamento de libro-akirado en la Nacia Biblioteko, kaj kolego kiu lekcias pri astro-biologio, aĉetinta mian libron *La Universo kaj Ni*. Venis ankaŭ konataj (sed malofte vidataj) gastoj, kiel Ĥaja – filino de Ans kaj Hans ten-Bakker, kaj la filino de la forpasinta Josef Murĵan, verkisto de la Hebrea-Espranta vortaroj.



Mezaĝa virino venis kun sia filino kaj aĉetis la libron “*Venis Vespero*” – ŝi rakontantis al sia filino ke ŝi lulis ŝin kiel infano legante de tiu sama libro (fama lul-libro en la hebrea), kaj kortuŝiĝis aŭdinte ke mi tradukis ĝin en E-on antaŭ 20 jaroj por mia filino Tali, kiu hazarde deĵoris apude...

Ankaŭ gravuloj vizitis. Inter la famaj vizitantoj de nia budo estis prezidento Ŝimon Peres. Kiam lia grupo haltis ĉe la apuda budo, mi demandis ĉu li memoras ke li estis la Alta Protektanto de la UK en 2000 – jes, li memoris, kaj kun intereso trarigardis la kantojn en la KD “Bonvenu Paco” kiun li tuj ricevis donace (*vidu surkovrile*). Vizitis la budon tri iamaj ministroj: du iamaj ĉefoj de la maldekstra partio Merce, Josi Sarid kaj Josi Bejlin, kaj la tria – iama vicĉefministro Moŝe Arens. Ni renkontiĝis kun la famaj israelaj verkistoj David Grosman (en la foto ĉi-supre) kaj Meir Ŝalev. Ankaŭ ili ricevis la kompakt-diskon “Bonvenu Paco”.

En la antaŭlasta tago mi faris publikan prelegon pri la temo “Esperanto kaj Zamenhof: kial internacia lingvo?”, kiu estis anoncita en la oficiala programo de la Foiro. Estis pluraj intervenoj kaj demandoj pri la rolo de E-o en la nuntempa mondo, apud kaj malantaŭ la angla. La konkludo de la prelego kaj de la Foiro semajno estis ke Esperanto vivas, alternativaj, kaj interesas multajn, eble pli ol ni, la esperantistoj, imagas.

* Pliaj fotoj estas videblaj en la retejo:

<http://picasaweb.google.com/Amri.nivut/LibroFoiroEsperantoBudo2009>

La 2-a Mezorianta Kunveno en Turkio

Esti Saban

SEKVE DE la pasintjara unua *Mezorianta Kunveno* en Amano, Jordanio, okazis inter la 3–6-a de aprilo 2009 en la urbeto İznik en Turkio la dua Mezorianta Kunveno. Mi partoprenis ĝin kune kun 50 esperantistoj el 14 landoj, preskaŭ ĉiuj el Eŭropo kaj Turkio. Espereble en la venontaj Kunvenoj partoprenos pli el mezoriantaj landoj!

La programo enhavis diskutojn, prelegetojn, prezentaĵojn kaj ankaŭ ekskursojn. Estis duon-taga ekskurso en la urbeto İznik, kaj tut-taga ekskurso en la urbo Bursa. Okazis ankaŭ postkongreseto al belega Istanbul. Mi gratulas la organizantojn Renato Corsetti, Murat Özdizdar, Can Şenel kaj Tom Juval.



Mia Esperanta travivaĵo en Japanio (parto II)

Hagar Lidor

Elhebregis: Amri Wandel

Lastan fojon ni lasis Hagar ĉe Oomoto, komunikiĝanta nure per Esperanto. Kiel promesite, ŝi daŭrigu la rakonton pri sia spertoplena vizito.

POST LA mirinda vizito ĉe Oomoto mi daŭrigis al Nagojo, Takajama kaj Hiroŝimo, kie mi gastis ĉe la geedzoj Osioka, kiuj dum la jaroj gastigis en sia hejmo jam pli ol 200 esperantistojn. Ilia gastigado estis mirinda el ĉiu aspekto. Kiel planite ili venis preni min de la stacidomo en Hiroŝimo kaj en sia hejmo preparis bonegan lokan tradician manĝon Okonomiyaki. Poste ili klarigis al mi kiel funkciigi la domon, donis grandan koverton kun mapoj kaj klarigoj kiujn ili preparis por mi, kaj samnakte forveturis por tri tagoj, lasante min ĝui la urbon sole. Por mi estis ne perceptebla kiel oni lasas sian hejmon al tute fremda persono, pri kiu oni scias nur ke ŝi parolas Esperanton.



Aldone al la domo, ili preparis rizon por la tuta semajno, invitis min gustumi de ĉio kio troviĝis en la fridujo (ili eĉ preparis etajn etiketojn kiuj klarigis en Esperanto kio troviĝas en ĉiu skatolo), kaj preparis rekomendojn por vizitindaj lokoj – lokoj kiujn mi neniam malkovrus kiel ordinara turisto. Ekzemple: *sakeo*-festivalo en la apuda urbo, kiu montriĝis esti aparte amuza travivaĵo. Post tri ege specialaj tagoj en Hiroŝimo kaj la ĉirkaŭaĵo, dum kiuj mi vizitis la Paco-parkon kaj la Atombombo-muzeon en Hiroŝimo kaj la magiece belan insulon Miaĝima, revenis la geedzoj kun du tajvanaj esperantistinoj. Ni pasigis kune tre agrablan vesperon, kaj matene mi daŭrigis la ekskurson.

De Hiroŝimo mi vojaĝis al Himeĝi, Okajama, Niko, Macuŝima kaj fine alvenis al Tokio, por la lasta semajno de la ekskurso. Tie mi gastis 4 noktojn ĉe juna esperantista paro, japano kaj koreanino, kiuj havas ĉarman

bebon unujaran. Ili konatiĝis en Esperanto-kunveno kaj parolas Esperanton inter si. Al la bebo ĉiu parolas en sia gepatra lingvo, sed kredeble la bebo sorbos ankaŭ Esperanton.

En Tokio mi vizitis kunvenon de Esperanto-klubo, kiun ĉeestis 4 japanoj, polo kaj usonano, kiuj vivas en Japanio. Ili multe demandis pri Israelo kaj impresiĝis de la “komplika” hebrea skribo (nekredeble kiel la hebreaj literoj aspektis al ili komplikaj kompare al la “simpla” japana skribo).

En ĉiuj lokoj kie mi gastis, mi dormis en tipa japana ĉambro: ege malgranda, kun Tatami-matoj kiel planko kaj futono kiel matraco. La travivaĵo de japanstila tranoktado en japanaj hejmoj donis al mi valoran sperton, kiu laŭ mia opinio malpli ekzistas en la Okcidento, ĉar oni povas tiom multe lerni de la restado en la japanaj hejmoj. Iliaj domoj estas unuflanke tre modernaj kaj teknologi-abundaj, sed aliflanke oni ankoraŭ konservas la japanan tradicion.

Eblas diri ke mi revenis el Japanio enamiĝinta: en la homojn, la manĝaĵojn, la kulturon. Kvankam verŝajne mi ne povus vivi en tia loko (malgraŭ ĉiuj avantaĝoj, ekzistas ankoraŭ signifaj kulturaj diferencoj, pro kiuj mi definitive preferas la vivon hejme, en Israelo), mi certe ĝojos reviziti Japanion. Restas amaso por vidi.


Evidente, la “Esperanta travivaĵo” en Japanio estis signifa parto de tiu ĉi magia ekskurso, kaj mi sentas bonŝanca pro tio, ke mi sukcesis konatiĝi kun tiu ĉi mondo kaj ekkoni la mirindajn homojn, kiuj tiom multe helpis al mi – en Israelo kiel en Japanio. La ĉefa afero, kiun mi akiris dum tiu ĉi ekskurso, estas la mirinda sento, kiun donas la fakto, ke homoj tute fremdaj al vi, pretas dediĉi tiel multe por helpi la alian (ĉi-kaze temas pri mi), sen havi profiton. Mia aspiro estas povi rekompenci ilian helpon per mia helpo al aliaj homoj – kaj provi pluen transdoni tiun mirindan senton.

RECENZO: pri la poemaro “Vespere” de Mikaelo Giŝpling

Luiza Carol

LA NOVA POEMARO de Mikaelo Giŝpling (eldonejo IMPETO, Moskvo 2008) allogas la legonton ekde la unua kontakto, pere de sia belega kovrilo, kiu prezentas pentraĵon de fama rusa pentristo Isa'ak Levitań (1860–1900). Ne temas pri simpla ornamaĵo aŭ pri alloga komerca prezentado de libro. Tiu

ĉi pentraĵo (kiu nomiĝas “Vespera sonorado”) reaperas ene de la libro, en la poemserio titolita “En la arta galerio”. Tie, la aŭtoro prezentas 10 pentraĵojn de Levitan, kiujn li ilustras per siaj poemoj. Plej ofte, la grafikisto estas tiu kiu ilustras la poemaron kaj kreas la kovrilon, enkondukantan en la etoson de la poemaro. Sed ĉi-foje la poeto estis inspirita de la dek pentraĵoj kaj ilustris ilin.



Por la kovrilo, la eldonejo elektis tiun el la pentraĵoj kiu plej bone difinus la tutan etoson de la libro. Ankaŭ la titolo de la libro bone rilatas kaj al la nomo de la kovrila pentraĵo kaj al la anima pejzaĝo de la poeto.

Ĉar la unua impreso de leganto estas la kovrilo, kaj ĉar en tiu ĉi aparta kazo la kovrilo tiom multe signifas por la tuteca ĝuado de la libro, mi diru kelkajn vortojn pri la pentristo Isaak Levitan. Li vivis dum la tempo de Zamenhof. Li estis judo, samkiel Zamenhof. Li naskiĝis en urbeto de Litovujo, proksime de Kaŭnas, la naskiĝurbo de la edzino de Zamenhof. Li loĝis en Moskvo dum la tempo kiam Zamenhof estis studento en la Universitato de Moskvo, en la medicina fakultato. Ĉu ili hazarde renkontiĝis? Ĉu ili konis aŭ almenaŭ aŭdis unu pri la alia? Ĉu Zamenhof admiris pentraĵon de Levitan ie en Moskvo? Ĉu Levitan konis Esperanton aŭ aŭdis opiniojn pri la internacia lingvo? Ĉu li havis sian propran opinion pri ĝi? Ni ne povas scii.

Kion ni ja scias, estas ke la pejzaĝoj de Levitan prezentas la tiaman Rusujon de Zamenhof, kaj la homoj kiujn ni vidas en liaj pentraĵoj estas vestitaj, samkiel la familio Zamenhof, laŭ la tiama modo (tial, ili pensigas onin pri la nigraj-blankaj fotoj de la familio Zamenhof). La poemo kiun Giŝpling verkis ilustrante la pejzaĝon “Vespera sonorado”, estas plen-plena de melodio kaj ritmo, kun neatenditaj rimoj, ritmaj ripetoj de vortoj aŭ de sonoj en la sama verso, kreante etoson kiu facile gluiĝas al la memoro. Jen fragmento:

“ La vespera sonorado / Softa voĉo de trankvilo. / Naĝas – bato post la bato – / Super svelta kampanilo / Naĝas tra vesper’ serena / Super bildo bukolika, / Super branĉoj de saliko, / Super fora kampo greno... / Naĝas sonoj sonorilaj, / Naĝas petoj plenumotaj / Ĉe kupoloj ore brilaj / Al nubetoj perlamotaj.”

Iusence, oni povas diri ke la tuta poemaro de Giŝpling estas aparta koncerto de poemoj-kantoj. En ĉiu strofo oni sentas la amon de la poeto al la lingvo. Kiel majstra violonisto kiu scipovas lertege kaj efike uzi ĉiujn eblecojn de sia amata violono, Giŝpling majstre uzas la eblecojn de la mirakla lingvo Esperanto.

La poemserio “En la arta galerio” inkluzivas kvaronon el la originalaj poemoj de la libro. Tio tute ne signifas, ke bunteco de koloroj kaj formoj mankas al aliaj poemoj. Kontraŭe. Dum en la poemoj dediĉitaj al la pentraĵoj de Levitan, la poeto kaj la pentristo iusence “kantas” duope, en la aliaj poemoj la poeto “kantas” sole, sed li ja emociiĝas antaŭ la koloroj kaj la formoj de la vivo mem, kiujn per siaj vortoj li “pentras” (aŭ eĉ “filmas”,



ĉar kutime li aldonas movadon al siaj priskriboj). Li ofte enŝovas priskribojn de odoroj kaj gustoj en siajn versojn, kreante vere vivplenajn pejzaĝojn. Jen, ekzemple, la suba fragmento el la poemo “Matene ĉe maro”:

“ Mi per la tuta Brust’ enspiris en ĉi hor’
Aeron kun odor’ de salo kaj de jodo...
Kaj regis ĉirkaŭ mi kvieto kaj silent’


De la senhoma bord’ kaj de l’dezerta rodo.
La maro – prapatrin’, lulilo de la viv’ –
Tenere prenis min por amo kaj kunfluo...
Mi naĝis, kaj la sun’ ekŝprucis post montar’
Kaj la malhela spac’ ekbrilis tuj per bluo. ”

Ok el la originalaj poemoj de Giŝpling ariĝas en la poemserio dediĉita al Hamleto. Mi opinias, ke tiuj poemoj ne estas parodioj laŭ la fama teatraĵo de Ŝekspiro. Almenaŭ mi ne sentis ilin kiel parodiojn, sed kiel tute

originalajn internajn monologojn jen de la roluloj, jen de la aktoroj kiuj identiĝas kun la ludataj aŭ luditaj roloj (sed samtempe iomete distanciĝas de ili mense), jen de la spektantoj meditantaj pri la ĝenerala senco de la spektaklo “Hamleto” (rilatante ĝin al la granda spektaklo de la vivo mem). Drameco estas grava eco de multaj poemoj en la libro, sed precipe en tiu ĉi aparta poemserio.

Ankaŭ la humuro, ĉeestanta en multaj poemoj de la libro, enestas tre multe en la poemoj pri Hamleto. Ofte temas pri malgaja humuro, eĉ nigra humuro, kiel ekzemple en la suba fragmento el la poemo “Sur la tombejo”, kiun mi elektis por ekzempli kaj la humuron kaj la dramecon troveblajn en la poemaro de Giŝpling. La rolulo kiu recitas la sekvan monologon estas *tombisto gaja apud tomborando*, kiu malkovras la kranion de la klaŭno Jorik’. Li diras:

“ En longa ĉen’ de naskoj kaj ekstermoj
 Tombisto estas grava element’ –
 Li fosas kavon, plu laboras vermoj
 Kaj kun la ter’ miksiĝas la klient’.
 Kaj min kaj vin englutos la mallumo,
 Ne helpos jam doktor’ nek eliksir’,
 Vi estas homo, sed vi estos humo...



Do kion fari, mia kara Sir’?”

En tiuj strofoj, oni sentas la humuron kaj la nigran ironion pere de la vorto “klient’”, pere de la similsonoraj vortoj “homo” kaj “humo” (kvazaŭ ne estus granda diferenco inter *homo* kaj *humo*) kaj eble ankaŭ pere de la vorto “Sir’” – ne nur ĉar ĝi estas neatendita rimo, sed pro la fakto ke ĝi atentigas nin pri la nobla deveno de Hamleto, en cirkonstanco kiam la ideo de nobleco (aŭ ajna interhoma diferenco) jam ne gravas (la antaŭajn vortojn ĵus substrekis la fakto, ke ajna homo estos fin-fine “klient’” de la tombisto: “Kaj min kaj vin englutos la mallumo,” t.e. la tombisto kaj la princo simile finos; tamen la tombisto zorgas pri la etiketo kaj nomas la princon “*Sir’*”).

Multaj poemoj en tiu ĉi libro havas profundan filozofian dimension (precipe la serio pri Hamleto). En la impresa longa poemo “Transe”, la

poeto imagas sin transirante la limon de la vivo, kaj la vojaĝo al la transmondo estas tre vive kaj emociplene priskribita, ĝis la lasta sojlo kie la espero estas forlasita (laŭ la bone konataj vortoj de Dante, kiu priskribis la plej faman vojaĝon en la transmondon).

Krom 40 originalajn poemojn, la poemaro de Giŝpling enhavas ankaŭ poemojn tradukitajn el la rusa kaj el la germana. Ĉar mi konas nek la rusan nek la germanan, mi ne povas komenti pri la akurateco kaj arteco de tiuj tradukaĵoj. Mi nur povas diri, ke legante ankaŭ tiujn poemojn mi admiris la



fluecon kaj la lertecon per kiuj la aŭtoro uzas Esperanton. Aparte plaĉis al mi la poemo “Nebela knabino” de Nikolaj Zabolockij. Mi nenion scias pri la aŭtoro de la originala rusa versio, sed tio ne malhelpis min ĝui la pensigan mesaĝon de la poemo.

Zabolockij priskribas “nebelan” knabino kun ĉarma infana personeco, kaj li konkludas tiel:

“ Do kio estas la beleco por ni
Kaj kial ĝin diigas la popolo?
Fiole, en kiu estas nur neni’
Aŭ fajro, kiu flagras en fiole? ”

Mi konkludu tiujn ĉi komentojn dirante ke mi ege admiras kaj la fiole kaj la fajron de la poemaro “Vespere”, ĉar laŭ mi la poemoj estas belaj kaj supraĝe (muziko, koloroj...) kaj profunde (ideoj, emocioj...). Mi tutkore gratulas la poeton Mikaelo Giŝpling pro lia emocia realigo.

Travivaĵoj en Nepalo

Amri Wandel

PARTO II – PRAARBARO KAJ TEMPLOJ

NEPALO estas lando de kontrastoj. Ĉe la piedo de la neĝkovritaj montopintoj de Everesto kaj Anapurna troviĝas riĉa kulturo, monaĥejoj kaj



temploj. En la malataj valoj troviĝas vilaĝoj, kampoj kaj praarbaroj. La ĉi-lastaj estis mia celo kiam mi descendis de la du-semajna migrado ĉirkaŭ la Anapurna kaj en ĝian neĝan koron – la “Sanktejo”. La praarbara rezervejo en la Reĝa Nacia Parko *Chitwan* estas mondfama pro ĝiaj tigroj, armoritaj renoceroj kaj abundo da aliaj bestoj. Dum tri tagoj mi loĝis en tendara ĝangala loĝejo, sorbis la animon de la praarbaro, furmatene ekmigrinte sur la dorso de trejnita elefanto por vidi la ĝangalon kaj serĉi bestojn, aparte la tigrojn. Plurajn fojon la gvidanto trovis freŝajn spurojn, kaj kunloĝantoj raportis pri efektiva spektado de tiu kaŝiĝema reĝo de la azia ĝangalo, sed mi ne havis tiun bon-ŝancon, kaj la solaj tigroj kiujn mi spektis persone estis en la fotilo de kunloĝejanoj.

De la natura sereno kaj izolo mi atingis la absolutan kontraston: religian festivalon en Pashpatinath, kvartalo de Katmandu. Ĉiujare ĝi logas dekmilojn da Hindu-kredantoj kaj pilgrimantoj, kiuj venas por ricevi benon de la sanktaj (sed ne tre alloge aspektaj) spiritaj gvidantoj (*aŭ almozpetantoj*) nomataj “Baboj” aŭ bruligi sian mortintan familianon ĉe la sankta rivero. Multe pli pura kaj bela estas la apuda kultura kaj historia urbo Baktapur, kies historia centro abundas je bele konservitaj temploj, palacoj kaj butikoj de artaĵoj kaj metiaĵoj por turistoj. La taŭga fino de tiu varia vojaĝo estis tamen la ĉefurbo Katmandu, kun ĝiaj imponaj monumentoj kiel Durbar-placo (mond-heredaĵo de Unesko) kaj giganta *stupa* (budhisma religia monumento), kiuj impresas ne malpli ol la neĝaj montoj. En la turisma kvartalo Tamel la vivo neniam haltas: monŝanĝantoj, butikoj de memoraĵoj, surstrataj manĝejoj... mi estis kontenta povi ripozi de tiu granda tumulto en la trankvila hejmo de mia esperanta gastiganto Razen kaj lia ĉarma familio, kaj kvankam mi maltrafis la klub-renkontiĝon de la



Katmandua Esperanto-grupo, okazis malgranda renkontiĝo de e-istoj en la hejmo de Razen, kie mi renkontis junan danan familion kiu laboras en internacia help-organizo en Nepalo.

Invito al la 10-a KIES

Amri Wandel

Karaj israelaj kaj eksterlandaj geamikoj,

La 10-a Komuna Israela Esperanto-Semajnfino (KIES) okazos fine de oktobro, en la jud-araba vilaĝo Nevé Šalóm (Esperante “Pacoazo”) apud Latrún, mezvoje inter Tel-Avivo kaj Jerusalemo. En tiu unika vilaĝo (kiu eĉ havas esperantan retpaĝon, <http://nswas.org/esperanto/index.htm>) loĝas harmonie judaj kaj arabaj familioj, kaj ni konatiĝos kun la kunvivado de judaj kaj arabaj familioj en Pacoazo, kadre de la ĉeftemo “Paco kaj kunekzisto”. Ni ankaŭ konatiĝos kun la belaj naturaj kaj kulturaj lokoj en ĝia najbareco: arbaroj, montaro, monaĥejoj... Same kiel pasintjare, KIES daŭros tri tagojn – de ĵaudo, 22.10 vespere ĝis sabato 24.10 (sed eblos partopreni ankaŭ partatempe). La kosto de unu nokto en dulita ĉambro, matenmanĝo kaj vespermanĝo estas ĉ. 250 NIS (45 eŭroj). Ni aparte bonvenigas eksterlandajn partoprenantojn, por kiuj ni povos aranĝi post KIES turismajn vizitojn en Jerusalemo, la Morta Maro kaj aliaj turismaĵoj. Bonvolu do jam rezervu la datojn en via kalendaro!



cxu sxajne IE estas novajx-bulteneto de iu malgranda komunumo?

ELI gratulas

- Jehudit EPSHTEIN – pro ŝia pentraĵ-ekspozicio pri 100-jariĝo de Tel-Avivo
- Luiza CAROL – pro la apero de ŝia unua libro en E-o
- Moshe kaj Liora BEN-PORAT – pro naskiĝo de la nepo
- Joni KISLEV kaj Neta – pro la inaŭguro de la nova hejmo.

Korespondpeto

Mi estas studento de animacio kaj mia revu estas fari animaciajn filmojn en Esperanto. Tiucele mi studas animacion ĉi-jare ĉe filma lernejo. Ĝuste nun mi volas montri al miaj samklasanoj (kaj instruistoj) ke ja ekzistas homoj tutmonde kiuj volas vidi novajn animaciaĵojn en Esperanto.

Se vi subtenas mian revon, bonvolu sendi poŝtkarton al mi ĉe la jena adreso:

Simmon Keith Barney
1111 Pacific St, # 407
Vancouver, BC
V6E 3X7 KANADO

PERSONA RENKONTIĜO: Ĉu Esperanto estas utila en nia vivo?

Dina Newman

En tiu ĉi rubriko ĉiufoje unu el niaj membroj aŭ gastoj prezentos sian specialan mondon: profesie, ŝatokupe aŭ alimaniere. Ĉi-foje ni renkontas *Dina*, esperantistino kaj ĵurnalistino ĉe la BBC, kiu estis sendita al Israelo profesie, kaj tute ne suspektis ke ŝi raportos ne nur pri judoj kaj araboj, sed ankaŭ pri... esperantistoj.



MI KOMENCIS lerni Esperanton antaŭ 27 jaroj en la Moskva Universitato. Tiutempe mia patrino dubis pri la utilo de mia nova hobbio. “Pli bone vi lernu la anglan,” ŝi diradis. “Almenaŭ ĝi estos utila por via kariero.” Kiel ĉiuj patrinoj, ŝi pravis, almenaŭ parte. Sen la angla lingvo mi ne povus labori kiel ĵurnalistino por la BBC-radio. Sed jaron post jaro evidentiĝas ke Esperanto ankaŭ ne malhelpas en mia vivo. Dank’ al ĝi mi venis al Londono; dank’ al ĝi mi loĝis tie preskaŭ senpage dum unu jaro kaj renkontis miajn plej bonajn anglajn geamikojn.

Ĉi-jare la BBC sendis min al Israelo dum la periodo de Pasko. Nenio okazis tiam en Jerusalemo. Niaj korespondantoj feriiis. Ĉiutage mi venis al la oficejo enua, pensante: “Kion mi faru dum la tuta tago hodiaŭ?” Miaj kolegoj en Londono demandadis per telefono ĉu mi jam trovis iajn interesajn ideojn. Mi hontis respondi ke tago pasas post tago kaj mi trovas nenion novan kaj interesan!

La surpriza solvo de mia problemo aperis post kiam mi kontaktis lokajn Esperantistojn. Dum mia unua renkontiĝo kun Amri Wandel mi ekciis ke Zamenhof estis judo kaj iam cionisto, kaj li celis Esperanton kiel solvon de “la juda demando” en la tiama Rusa imperio. Leginte la bonegan artikolon de Josi Ŝemer pri la sama temo mi konvinkiĝis ke temas pri interesa kaj ne vaste konata fakto kiu indas raporton ĉe BBC. Mi proponis la ideon al miaj redaktoroj en Londono, kaj ĝi plaĉis. Oni eĉ petis min verki ion ne nur por la radio, sed ankaŭ por la retpaĝo de BBC. Kiam mia patrino vizitis min en Jerusalemo, mi rakontis al ŝi kiel Esperanto savis min de senlaboreco en Israelo. Ŝi eĉ ne miris. “Se vi amas ion, ĝi ĉiam helpas al vi en via vivo,” ŝi rimarkis. Denove, kiel ĉiam, ŝi pravis.

Verdaj kaj bluaj steloj en Bjalistoko

Amri Wandel

BJALISTOKO estis por mi, kiel judo loĝanta en Israelo, unu el la plej bonaj el preskaŭ tridek UK-oj kiujn mi partoprenis ekde 1974. Grandan rolon en tiu pozitiva impreso ludis la organizantoj, sed ne malpli la urbaj instancoj kaj la enloĝantoj, kiuj entuziasme kunlaboris kun la esperantistoj por digne kaj agrable gastigi la kongreson festante la jubileon de la juda Bjalistokano Zamenhof, ne ignorante la judan pasintecon kaj eĉ emfazante ĝin. Tiuj pozitivaj spertoj malgravigis ĉe mi la impreson de la kelkaj kontraŭ-esperantaj (kaj eventuale kontraŭ-judaj) vandalaj agoj okazintaj dum la kongreso kaj antaŭ ĝi. Ekstremistaj grupoj troviĝas ĉie, sed mi emas kredi ke la urbaj instancoj kaj la lokaj amasoj sincere subtenis Esperanton kaj respektis la judan devenon de ĝia kreinto.

Jam alvene, sur la kajo en Bialistoko, videblis multaj verdaj flagoj kaj steloj kaj bone ekipita Esperanto-informbudo. La kongresa dokumentaro estis impone riĉa – diversaj turismaj prospektoj, reklamoj kaj kompakt-diskoj en E-o.

Alia prognozo de la bonvolo kaj klopodo de la urbestro digne gastigi la kongreson estis la impona urbestra saluto en escepte bona



Esperanto. Verdaj flagoj kaj kvinpintaj steloj videblis abunde en la urbocentro, kie oni povis vidi ankaŭ aliajn stelojn, sespintajn kaj bluajn “stelojn de Davido” – sur la israelaj flagoj ĉe la podio en la centra urba placo, kie okazis folkloro danc-festivalo paralele al la UK. Lunde oni prezentis tie Esperantan koncerton, kaj dum ĝia fina vespero (marde) aperis israela trupo, kiu prezentis jidajn kaj israelajn dancojn kaj kantojn, kaj ricevis longajn kaj entuziasmajn aplaŭdojn de la grandega spektantaro kiu plenplenigis la ĉefan placon. Samtempe en la kongresejo okazis belega klezmera (judmuzika) koncerto, kaj la kanton “Háva Nagíla” mi tiun vesperon aŭdis dufoje: en la urba placo


* Aperinta la 12.08.2009 en “Libera Folio”.

kaj denove en la klezmera koncerto ĉe la kongresejo. Tiun ĉi koncerton prezentis bonega kvinpersona Bjalistoka grupo, Ĉanajki. Dum plena horo ili kantis kaj ludis jidajn kantojn, fervorigante la spektantojn, kiuj ĉe la fino ekstaris kaj longe aplaudis.

Anekdote, tuj sekve de la klezmeroj, pluraj kongresanoj denove spektis verdan stelon (kvankam ne kvinpintan), ne surflage sed en la ĉielo, kadre de mia IKU–AIS kurso pri “400-jara jubileo de la Teleskopo”. Jidaj dancoj okazis ankaŭ dum alia IKU–AIS kurso, tiu de la israelano Tsvi Sadan (pri Esperanto kaj la jida lingvoj en la interreto), kiu fine de sia prelego surprizis la spektantojn per jidaj dancoj. Sadan prelegis ankaŭ kadre de la Esperantologia Konferenco, pri la juda fono de Zamenhof kaj Esperanto. Kortuŝe levis la judan historion en la kongresurbo la prelego de la pola esploristo Tomasz Chmielik [Tomaŝ ĤMJELIK], kiu tradukas en E-on parton de la libroj de Isaak Baŝevis Singer, pri la filmoj de la fratoj Goskind – judaj reĝisoroj kiuj filmis la judan vivon



cy języka esperanto pol. XIX w. - 1935



en ses polaj urboj, kelkajn monatojn antaŭ la komenco de la Dua Mondmilito (konserviĝis nur kvin, el ili tiuj pri Bjalistoko kaj Varsovio estis projekciitaj dum la prelego). Ili fidele registris la vigran vivon en la judaj kvartaloj, vivo kiu baldaŭ poste malaperis en la Holokaŭsto. Tiu malaperinta pasinteco reflektiĝis ankaŭ en la skribaĵo sur la urba gvidtabulo ĉe la domo de Zamenhof (kaj aliaj pasintecaj monumentoj): “Tio, kio ne plu ekzistas”.

Okaze de la kongreso kaj la 150^a jubileo de Zamenhof, la urbo kreis turisman “Esperanto-kulturan vojon” – promen-itineron tra pli ol dudeko da gravaj monumentoj kaj lokoj, ĉ. duono da ili ligitaj al Zamenhof (kiel la domo kie li naskiĝis, lia lernejo, lia monumento) aŭ portas lian nomon (kiel ŭlica Zamenhofa, du kulturaj centroj, porinfana hospitalo, kafejo). Estas indikita ankaŭ la sinagogo (sed bedaŭrinde ne la juda tombejo). Apud tiuj monumentoj troviĝas klarigaj tabuloj trilingvaj: en la pola, Esperanto kaj la angla. Aldone aŭtobusoj portis ŝildojn Esperante, E-menuoj troviĝis en restoracioj, kaj homoj surstrate interesiĝis pri Esperanto.

Parenteze, similan konservemon kaj restaŭradon de la juda pasinteco, kvankam nuntempe sen judoj, mi spertis en la bele restaŭrita juda kvartalo en Krakovo (*Kajimeŝ*) – en forta kontrasto al la situacio en la okdekaj – kaj ĉe judaj monumentoj en Varsovio (la juda tombejo, monumentoj de la getto, la sinagogo kaj la juda teatro).

Aldonas Josi Ŝemer:

En la unua vespero, sabate, estis prezentitaj dum 1½ horoj belegaj kantoj de la tiama juda urbeto (*Ŝtetlo*). Kantis ilin jidlingve kaj hebree la konata polino Irena Urbanska, akompanata de s-ro Lic, kiu ludis alterne per kelkaj muzikiloj. Ankaŭ tiu ĉi koncerto akiris grandan sukceson. La urbestro tre malavare kaj larĝanime dediĉis al ni – la kongresanoj kaj la movado – sian fortostreĉon. Interalie ili substrekis per diversaj dumkongresaj artaj / judkulturaj programoj la judecon de Zamenhof kaj de la tiama Bjalistoko. Tiu ĉi urbestro ankaŭ iniciatis antaŭnelonge partan riparadon de la juda tombejo; kaj mi ricevis informon pri tio, ke la vicurbestro Aleksander Sosna (ankaŭ prezidanto de la LKK) multe agas por konservi la memoron de la nepolaj etnoj vivintaj en tiu ĉi urbo antaŭ la mondmilito.

Israelanoj aktive partoprenis en la 94-a UK

En la kunveno de prezidantoj de Landaj Asocioj, *Amri Wandel* prezentis la agadon de ELI. *Jehoŝua Tilleman* anstataŭis nian komitatanon A. En la Movada Foiro Amri informis pri la KIES en la ELI-budo. En la inaŭguro salutis nome de Israelo *Luiza Carol* (kies teartaĵo gajnis en la Belartaj Konkursoj), per du vortoj: ‘Ŝalom’ kaj ‘Salam’. Krome salutis kvar “Zamenhofidoj”: kiel ĉiam la nepo Louis Zaleski-Zamenhof, liaj du filinoj (unu el ili salutis persone kaj

la alia per letero legita de la patro) kaj *Magda Barbas*, pranepino de Aŭgusta, la fratino de L. L. Zamenhof.

Du el la tri prestiĝaj IKU–AIS



kursoj en la ĉi-jara IKU-sesio estis prezentitaj de israelanoj, kiel jam menciite ĉi-supre; en la unua prelego de ambaŭ kursoj ĉirkaŭ cent aŭskultantoj plenigis la salonon.

Luiza kaj *Amri* prezentis siajn verkojn kadre de “Aŭtora Duonhora”, kaj *Esti Saban* reprezentis Israelon en la kunsidoj de la Komisiono pri Azia E-Movado.

En la foto, de maldekstre: Aleksandra (patrino de *Magda*), *Josi Semer*, *Magda Barbas*, *Barbara Pietrzak*, *Amri Wandel*.

Omaĝe al la 70-jariĝo de Boris Kolker

Boris, mi ĝojas vin gratuli / Pro l' sepdekjara datreveno!
Vi ne vegetis, kiel planto – / Vi venis ja por inokuli
Al la homaro senkomprena / L' amatan lingvon Esperanto.
En vasta Esperanto-lando / Kun vi – plej sperta ĉiĉerono –
Alloga estas la vojaĝ'... / Kaj sekvas vin en granda kvanto
De lecion' al leciono / Disĉiploj ĝis la lasta paĝ'.
Boris, la sanon plu konservu / Por la labor' abnegacia...
Ne senakviĝu via font'! / Do same agu, same vervu,
Por ke l' parol' internacia / Plu disvastiĝu en la mond'.

M. Giŝpling

Ĉi-somere, Boris Kolker festas siajn 70 jarojn de junkoreco, tial liaj lernantoj kaj lernintoj (inkluzive de mi) markas la eventon rememorante liajn tre gravajn esperantistajn agadon kaj verkojn. Mi opinias ke la profesio de instruisto estas per si mem profesio de optimismaj kaj junkoraj homoj, kaj tio aparte validas kiam la objekto de instruado estas Esperanto. Boris Kolker instruis al multegaj homoj la lingvon de espero, kaj unu el liaj plej fruktodonaj agadoj estis la koresponda perfektiga kurso “Vojaĝo en Esperanto-lando”, kiun mi havis la ŝancon partopreni. Tiu kurso fariĝis unu el la plej valoraj travivaĵoj en mia vivo. Mi deziras al mia amiko Boris sanon, ĝojon kaj multajn pluajn jarojn de fruktodona agado. Tutkore,



Luiza Carol

En la jaro 2000, freŝbakita esperantisto, mi aĉetis la libron de Boris Kolker “Vojaĝo en Esperanto-Lando” (Moskvo, 1992). Kiel perfektiga kurso de Esperanto, ĝi postulis de mi seriozajn sindevidojn kaj memdisciplinon. Je la fino de 2002, post la aĉeto de la nova eldono (fare de UEA) de tiu libro, mi fariĝis la unua israela lernanto de la koresponda perfektiga kurso de Boris. Per helpo de liaj lecionoj kaj de akirita memfido dank' al kuraĝigo de Boris, en 2003 dum la UK en Gotenburgo, mi pli ol sukcese trapasis la meznivelan ekzamenon de UEA–ILEI. Malgraŭ mia 40-jara limiga fono pri informadiko kaj teknologio, Boris helpis al mi malkovri

post la diplomiĝo iris al Kembrigo (Anglio) por plustudi la anglan. Tie ŝi akiris diplomojn pri tradukado kaj pri lingvo-instruado. Reveninte al Bukareŝto, ŝi fariĝis instruistino pri la franca kaj angla lingvoj kaj poste sekretariino en importo-agentejo.

En 1959 ŝi renkontis Jozefon Petrin, kiu estis tiam la centra figuro de la rumana Esperanto-movado, kaj aŭdis de li pri Esperanto. Ŝi estis tre impresita pri la ideo de E-o kaj decidis, ke ŝi foje lernos la Internacian Lingvon. En 1964 ŝi enmigris Israelon kun sia edzo kaj iliaj filo kaj filino. Ili ekloĝis en Naharija, kie ŝi laboris en granda firmao kiel sekretariino, okupiĝante pri tradukado de dokumentoj kaj pri kontaktoj kun eksterlando. Post kvin jaroj ili transloĝiĝis al Tel-Avivo, kie ŝi denove eklaboris kiel altranga sekretariino en granda importo-agentejo. Tie oni profitis de ŝia kono pri fremdaj lingvoj kaj de ŝiaj diligenteco kaj akurateco.

En la mezo de la 80-aj jaroj ŝi lernis Esperanton. Ŝia kono de kelkaj eŭropaj lingvoj (rumana, franca, angla kaj germana) multe helpis tiam al ŝi rapide ekregi la novan lingvon.

Iren komencis vizitadi regule la Esperanto-klubon en Tel-Avivo, fariĝante fervora aktivulino. Dum kelkaj jaroj ŝi estris la klubon prizorgante ties programon kaj dum pluraj jaroj membris en la Estraro de Esperanto-Ligo en Israelo. Iren estis Individua Membro de UEA inter 1985 – 2003 kaj partoprenis kelkajn Universalajn Kongresojn: Bergeno (1991), Prago (1996), Montpeliero (1998) kaj Tel-Avivo (2000).

Iren estis sportema virino, kiu ludis tenison dum multaj jaroj kaj naĝadis regule, ĝis la aĝo 94! (Ŝia edzo forpasis jam en 1992.) En la lastaj kvar jaroj ŝi ĉesis, pro sanproblemoj, viziti nian klubon. Ŝi forpasis hejme postlasante 2 gefilojn, 6 genepojn kaj 15 pragenepojn. Iren estis tre bonkora homo, tre simpatia, honesta, tre afabla kaj helpema. Mi memoras ŝin dediĉi dekojn da horoj por instrui per telefono Esperanton al franclingva lernantino el Aŝdod. Ofte ŝi rakontis al la homoj pri Esperanto, klopodante konvinki ilin ĝin lerni.

Ŝi estis amata de ĉiu esperantisto kiu ŝin konis. Estu benata ŝia memoro!





Maldekstre: kantgrupo Asorti
en la Tel Aviva klubo.
Sube: JELI kunveno ĉe la
observejo en Makabim.
Sube maldekstre: REVI ĵip-
ekskurso ĉe Morta Maro



ELI-ekskurso al Jafo, majo 2009

